

Ora Ĵurnalo

Numero 39, Aprilo 2021



Printempa promeno en Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	La stilo de Gustavo la III:a	21
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Galerio de la tempo de Gustavo la III:a	22
Espeporko meditas.....	3	Språket Esperanto.....	23
Enketo de Unesko al ĉiuj esperantistoj – Enkät från Unesco till alla esperantister	3	Tänk dig att alla världens språkvetare verkligen skulle analysera språkens kvalitet och logik i sökandet efter ett världsspråk... ..	25
En vandring på Hunneberg med ett spännande möte i skogen den 20/3 2021 – Promeno en Hunneberg kun streĉa renkontiĝo en la arbaro 20/3 2021	4	La kvara parto de alfabeto ludo de Inga Johansson.....	25
Inga trovis esperantan printempan hajkon en islanda retejo.....	5	Språkförsvaret debatterar	26
Birdonestoj.....	6	Varje dag lär man sig något nytt – Ĉiun tagon oni lernas ion novan	27
Diversaj manieroj esprimi bondezirojn.....	6	Ĉio estas grava	28
Du malnovaj svedaj paskkartoj	7	Malŝaltu la lampojn por la bonfaro de bestoj!.....	28
Från Göteborgsposten den 10 mars 2021 – El Göteborgs-Posten 10 marto 2021	8	Flagoj kun simboloj.....	29
Greta Thunberg nun estas statuo en Anglujo – Greta Thunberg finns nu som staty i England.....	8	Att arbeta som dataingenjör. Richard Benjaminsson berättar. – Labori kiel komputila inĝeniero. Richard Benjaminsson rakontas.....	30
Adiaŭ al la Unuiĝinta Reĝlando?	9	Att arbeta som hissreparatör. Oskar Bengtsson berättar. – Labori kiel lifto- riparisto. Oskar Bengtsson rakontas.....	31
Recenzo fare de Richard Forsyth pri la libroronda libro	12	Interlingvistikaj studoj en Pollando	32
Bo Sandelin rakontas pri Olle Olsson, la ŝatata esperanto-instruisto de Skanio	13	Atelieroj en Kultura Esperanto-Festivalo 2022	33
Printempaj hajkoj.....	14	Västsvenska författarsällskapet.....	33
La naturo skulptis "ŝtonan urbon"	15	Göteborgs Esperantoförening inbjuder till novellskrivning på esperanto.....	34
Al la "Guĉoj" kaj la malsanuleja sekcio 357.....	17	Penseo – Muziko.....	34
La Dinastio Broström en Gotenburgo, parto 3.....	20	Vår affisch hos Tidskriftsverkstan	35

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68. Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com. *Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon.*





Espeporko meditas

- ☆ En malnovaj tempoj oni ŝatis trompi unu la alian dum la unua de aprilo. Aprila ŝerco povus esti la jena: – Kial estas .org post la retadreso www.esperanto-gbg.org? Kompreneble .ORG aludas la urbon GötebORG. (Ŝerco post la retkunveno kun la pola klubo Torento.)
- ☆ Mi do partoprenis mardan kunvenon rete kun la klubo Torento. La tasko estis rakonti pri la plej stranga loko, al kiu Esperanto venigis min. Mi ne sciis ekzakte kie en Ĉeĥio estas mia "ŝtona urbo", mi nur memoris skulptitaj ŝtonegoj, kiuj similis al "La mano de Dio", "La rostro de elefanto" kaj la "Plumtufo de indiano". Sed Paulina sciis, kaj rapide faris artikolon pri tiu loko.
- ☆ Ĉu vi povas imagi Anglion sen monarkio kaj reĝino?? Malfacile, sed Riksablo povas. Li klarigas kiel anstataŭigi la nunan sistemon per nova.
- ☆ Riksablo estas partoprenanto de la librorondo kun libro, kiun li pli frue recenzis, "Sesdek ok".
- ☆ Hospitaloj havas homajn anĝelojn kiuj strebas batali kontraŭ la korona-viruso. Paralele ankaŭ estas flegado de "kutimaj" malsanoj. Christin Granat pasigis tempon en malsanulejo. Ne nur estas akraj injektiloj kaj intensa provfarado, sed ankaŭ amuzaj kaj ridindaj momentoj. Christin rakontas pri "Guĉoj".
- ☆ Ora Ĵurnalo partoprenos en ekspozicio fare de Tidskriftsverkstan (la Revua laborejo). Entute membras 25 revueldonantoj. La ekspozicio aperos en bibliotekoj en la provincoj Kalmar kaj Bohuslando. Unu el la bildoj Folke Wedlin faris kun teksto de Andreas. Vi trovos ĝin sur la lasta paĝo.
- ☆ La serio pri la gotenburga familio Broström daŭras. Oni povus skribi romanon pri la interesa familio, kiu signifis multon por la ŝipkompanio en Gotenburgo, sed pli kaj pli la familio glitis malsupren sur la societaranarnason.
- ☆ Lastfoje Bo Sandelin rakontis pri la vojo de Esperanto al sia vilaĝo. Jen la daŭrigo en la sveda por ke junaj (ankoraŭ) neesperantistoj facile legu ĝin!
- ☆ Li ankaŭ plibonigas nian scion pri Olle Olsson, la konata esperanto-instruisto en Lund, pri kiu ankaŭ Sten Johansson skribis en "Sesdek ok".
- ☆ Kiam la komputilo ne obeas min, mi malĝojas. Feliĉe troviĝas inĝenieroj, kiuj povas obeigi komputilojn. Unu el ili estas Rikard.
- ☆ Penseo, eldonita de la ĉino Vejdo, strebas kolekti origine skribitajn poemojn de la tuta mondo. Vi havas la adreson kaj mi instigas vin skribi poemojn. /Siv

Enketo de Unesko al ĉiuj esperantistoj – Enkät från Unesco till alla esperantister

Gravega informo – POR DISKONIGI. Renato Corsetti skribas:

La enketo postulas 1 minuton por respondi kaj tio eblas ĝis la fino de aprilo. Ni atentu ke UNESKO konas la nombron de la

respondintoj!!! Sekve, tute NE eblas fanfaroni pri "mirinda nombro da esperantistoj". Pro tio ni bonege diskonigu tiun enketon en la esperantistaj medioj, sen forgesi la "amikojn" de Esperanto. Unesko notis kun kontento, ke en nur du-tri tagoj jam 600 esperantistoj

respondis al la enketo. Ili atendas ankoraŭ pliajn milojn. Ni daŭrigu informi pri la enketo (apartan dankon al Trezoro, kiu abunde

disinformis en Fejsbuko kaj en la ĉina en Ĉinujo).

Jen la ligilo al la enketo, bv respondi al ĝi:

<https://en.unesco.org/futuresofeducation/top-3-challenges-and-purposes-education/Esperanto>

En vandring på Hunneberg med ett spännande möte i skogen den 20/3 2021

Promeno en Hunneberg kun streĉa renkontiĝo en la arbaro 20/3 2021

Vi var tre personer som gjorde en solig men lite kylig promenad på cirka 7 km på Hunneberg. Det var på en bomväg förbi sjön Grågåsen och torpet Fagerhult.

Kronan inlöste Fagerhult som kronojägarboställe 1830, vilket det var fram till 1939, då det blev skogsjordbruk fram till 1961. Gustaf V flyttade jaktlunchen, vid älgjakten, till Fagerhult, då han tillträdde som kung. Vid jaktlunchen fick kronojägarfamiljen utrymma stugan, men fick som ersättning 50 kr (mer än en halv månadslön). Dock skulle jaktgästerna hållas med bulle till kaffet.

Vi passerade sedan förbi Grinnsjön.

Då träffade vi en fågelfotograf, som fortfarande var uppskakad efter att ha blivit jagad av en spelgalen tjädertupp (urogalo). Efter lite tvekan lovade han att gå med oss till tjädern. Vi gick försiktigt efter en stig mot en mosse. Plötsligt hördes ett klunkade ljud, som från en uppryckt buteljork, till vänster om stigen. Det var tjädertuppen, som spelade med uppspärrad stjärt mellan trädstammarna. Vi avancerade något, men inte så långt att den anföll oss. Sen drog vi oss tillbaka efter det spännande mötet i skogen.

I övrigt när det gäller fåglar kan nämnas 2 formationer med sträckande sångsvanar, en födosökande storskarv (granda kormorano) i Grinnsjön, ett knip-par och gräsänder i sjön Grågåsen och en domherre (pirolo) i en trädtopp vid Öjemossarna.



Torpet Fagerhult, Hunneberg. / La servutbieneto Fagerhult, Hunneberg.



Vattenpump med krona vid torpet Fagerhult på Hunneberg. / Akvopumpo kun krono ĉe Fagerhult.

Bifogad bild på tjädertuppen är fotograferad på samma ställe dagen efter av Rudi Jelinek.

Vid pennan /Jan Hellström

Ni estis tri personoj kiuj faris sunan sed iom malvarman promenon de proks. 7 km sur la monto Hunneberg. Ĝi okazis sur barita vojo preter la lago Grågåsen kaj la servutbieneto Fagerhult.

La ŝtato elaĉetis Fagerhult por esti loĝejo de ŝtata forstisto en 1830, kia ĝi restis ĝis 1939, kiam ĝi fariĝis arbarbieno ĝis 1961. Gustavo V translokigis la ĉaslunĉon, okazanta dum la alko-ĉasado, al Fagerhult, kiam li fariĝis reĝo. Ĉe la ĉaslunĉo la familio de la ŝtata forstisto devis evakui la dometon, sed ricevis kompanse 50 kronojn (pli ol duona monata salajro). Sed oni devis regali la ĉasgastojn per bulkoj ĉe la kafumado.

Ni preteriris la lagon Grinnsjön.

Tiam ni renkontis birdfotiston, kiu ankoraŭ estis skuita post esti ĉasata de ludfrenza urogalo. Post iom da hezito li promesis akompani nin ĝis la uragalo. Ni singarde iris laŭ pado al marĉejo. Subite aŭdiĝis sono, kvazaŭ tiro de korko el butelo, maldekstre de la pado. Estis la uragalo, kiu ludis kun disetendita postaĵo inter la arbotrunkoj. Ni



Tjädertupp/urogalo, Hunneberg. Foto Rudi Jelinek mars/marto 2021.

avancis iom, sed ne tiom longe, ke li povus ataki nin. Poste ni retiriĝis post la streĉa renkontiĝo en la arbaro.

Cetere pri birdoj mi povas mencii 2 formaciojn de are flugantaj kantcignoj, manĝoserĉantan grandan komoranon en Grinnsjön, paron de klanguloj kaj platbegan anason en Grågåsen kaj pirolon sur arbopinto ĉe la marĉejoj Öjemossarna.

La urogalo estas fotita samloke la tagon poste de Rudi Jelinek.

/Jan Hellström

Inga trovis esperantan printempan hajkon en islanda retejo

En <https://poetika.esperanto.is> ofte estas tekstoj en diversaj lingvoj.

Kun lumo brila
en bluo superkape
la lun' aprila.



Birdonestoj

Hans-Georg Kaiser:

Humuro en Esperanto (en arto,
literaturo kaj vivo) dekstre ⇒

Kaj mia ordinara birdonesto ⇩



Manko de loĝejoj en la gotenburga regiono estas granda kaj por homoj kaj por birdoj. /Siv



Diversaj manieroj esprimi bondezirojn

Komparu la florantan lingvon de Samarkando kun la pli restrikta lingvo de mi, svedino! Tamen ni ambaŭ vere sincere deziras ĉion bonan al unu la alian.

La 2an de aprilo 2021 Samarkandiana skribis la jenan:

Karaj geamikoj,

Akceptu miajn sunplenajn gratulojn okaze de la Hela Pasko!



*Ni deziras al vi kaj viaj familianoj
bonan sanon, bluan ĉielon,
vivoptimismon, familian harmonion,
bonfarton kaj feliĉon,
belajn kaj bonhumorajn
festotagojn!*

Serenan Paskon 2021,

Anatolij & familio



Re: 2021 Paskajn salutojn el Samarkando!

Koran dankon, Anatolij!

Ni deziras la samon al vi!

Por la Esperanto-Societo de Gotenburgo

Siv Burell



La diferencoj inter kutimoj donas koloron al la vivo, ĉu ne? Antaŭe oni sendis koloritajn paskkartojn, sed nuntempe malfacilas trovi paskkartojn.

Abundas nur kristnaskkartojn. Mi ricevis unu hieraŭ – kun paskaj salutoj. /Siv

Du malnovaj svedaj paskkarto



Från Göteborgsposten den 10 mars 2021

Martin Koc läste en gång om en kvinna som köpte en kartong ägg och en dag fick en kyckling.

Under pandemin arbetade Martin hemifrån och tänkte att nu, just nu skulle det vara roligt att pröva. Han köpte en äggkläckningsmaskin och ägg. Och ja, han lyckades få två kycklingar som han döpte till Johnny och Konny. De följde honom vart han gick i lägenheten. Trevligt att ha sällskap i pandemitider, tyckte Martin.

Jag undrar, hur det går när kycklingarna växer. Kan man ha höns i en lägenhet i centrala Göteborg? /Siv



El Göteborgs-Posten la 10:an de marto 2021

Martin Koc iam legis pri virino, kiu aĉetis kartonon da ovojn kaj iun tagon ricevis kokidon.

Dum la pandemio Martin laboris de sia hejmo pensante ke nun, ĝuste nun, estus ĝoje provi.

Li aĉetis kovaparaton kaj ovojn. Kaj jes, li sukcesis ricevi du kokidojn, kiujn li baptis Johnny kaj Konny. Ili sekvis lin kien ajn li iris en la apartamento. Agrable havi kuneston dum pandemiaj tempoj, Martin pensis.

Mi cerbumas kio okazos kiam la kokidoj kreskas. Ĉu oni povas havi kokojn en apartamento de centra Gotenburgo? /Siv

**Greta
Thunberg
nun estas
statuo en
Anglujo**



**Greta
Thunberg
finns nu som
staty i
England**

Greta Thunberg nun estas statuo ĉe la universitato de Winchester en suda Anglio, laŭ Dagens Nyheter.



18-ĝrīga Greta Thunberg blev staty vid universitetet i Winchester i sōdra England, enligt Dagens Nyheter.

En la 30a de marto la bronza reproduktaĵo realiĝis, post preskaŭ

jaro da laboro de la artistino Christine Charlesworth.

La universitato en Winchester en suda Anglio dum kelkaj okazoj faris aktivajn decidojn, kiuj montras ke ili prizorgas la medion. I.a. la universitato havas propran nutraĵvendejon kun bazaj principoj eviti mangoperdon. Kaj ili pli frue anstataŭis ĉiujn unufojajn artiklojn de plasto per utilaj egalajoj. El Twitter.

Ĉu Greta Thunberg havos statuon en Svedio?

Ĉu pli bonas se oni demandas kial ŝi ne ricevis statuon ol kial ŝi ricevis statuon?

Kion vi pensas? /Siv

nĉstan ett Ārs arbete av konstnĀren Christine Charlesworth.

Universitetet i Winchester i sōdra England har vid flera tillfĀllen gjort aktiva val som visar att de vĀrnar om miljōn. Bland annat har skolan en egen livsmedelsbutik med en policy om noll matsvinn. Och de har tidigare ersatt alla engĀngsartiklar i plast med miljōvĀnliga motsvarigheter. FrĀn Twitter.

Kommer Greta Thunberg att fĀ en staty i Sverige?

Ār det bĀttre om man frĀgar varfōr hon inte fick en staty Ān varfōr hon fick en?

Vad tycker du? /Siv

Adiaŭ al la Unuiĝinta Reĝlando?

de Richard Forsyth

En Britio, ni konsideras nian politikan sistemon demokratia. Svedio similas, kvankam ne precize samas. Sed, ĉu lando povas esti kaj monarkio kaj demokratio? Laŭ mi: iom, jes; ĝisfunde, ne.

Dum mia tuta vivo, la plejparto de la brita popolo aprobas la monarkon, kaj, nur ete malpli, la monarkion. Ekzemple, la retejo https://www.republic.org.uk/a_new_head_of_state havas nur malfortan subtenon. Tamen, tre

lastatempe, ekzistas signoj, ke tiu aprobo ne estos ĉiam garantiita. Opinisondoj komencas montri, ke, inter junuloj, skeptikismo pri la valoro de monarkia sistemo komencas kreski.

La jenaj bildoj montras, ke oni movis la statuon de Reĝino Victoria el la centro de Leeds al periferia loko en parko en 1937, cent jarojn post ŝia ekregno. Nun iuj povas imagi ion similan rilate al la reala monarko. (Ĉu tia afero eblos en 2037?)



La statuo de Reĝino Victoria forlasas centran Leeds, 1937. Foto: Wikimedia.



Statuo 'emerita' de Reĝino Victoria en periferia loko, Leeds 2021. Foto: Richard Forsyth.

Se la britoj iutage deziras forigi sian monarkian sistemon, kun kio ili anstataŭos ĝin? Ŝajnas, ke la kutima respondo estas: per respubliko kun prezidento, kiun oni elektas per nacia balotado. Tamen, la historio plenas je potencaj estroj, ne malofte elektitaj per balotado, kiuj suferegigis siajn popolojn, kaj aliajn popolojn. Do la subtenantoj de tiu ideo postulas, ke la ofico estu tute aŭ almenaŭ ĉefe ceremonia; mallonge, ke iu ajn prezidento de ia estonta brita respubliko havu iom malpli da potenco ol la nuna reĝino.

Nu, bone; sed mi proponas alian ideon – bazita de la koncepto de lotumado. Mi uzas tiun vorton kiel tradukon de 'sortition' en la angla. Vidu:

<https://en.wikipedia.org/wiki/Sortition>.

Bedaŭrinde mi ne trovas ĝuste tiun nocion en Vikipedio. La baza ideo, tamen, estas simpla: elekti homojn por postenoj per hazarda (=aleatora)

metodo. La antikvaj grekoj praktikis tian metodon en la plej frua fazo de la demokratio.

Unue, ni bezonos unuigintan ĝisdatan nacian registron enhavante la nomojn de ĉiuj, kiuj rajtas daŭre loĝi en la lando. Mi nomas la homojn en tiu registro 'landanoj', ĉar, samkiel por voĉdonado, ne necesas, ke ili oficiale estu civitanoj.

Due, unu el tiuj estos selektita de la registro, tute hazarde (=aleatore). Jen la nova monarko! Tiu homo tiam devos 'ombrumi' la tiutempan monarkon, por lerni kiel plenumi la taskojn de la ofico. Tiu provizora fazo daŭros dum tri monatoj. Tiam, post tri monatoj, la nova monarko plene prenos la rolon, por periodo de ne pli longe ol kvar jaroj.

Tria afero: devos okazi dum tiuj kvar jaroj, ĉiuduonjare, aprezo de la konduto de la tiutempa monarko. Tiucele, oni elektos aron de dudek da aprezantoj. Kiel elekti tiuj aprezantoj? Vi jam divenis, ĉu? Evidente: tute hazarde, el la landanoregistro! Ili kunvenos dum, ekzemple, semajnfino.

Sabaton:

La unuan tagon ili kunvenas, diskutas en grupoj de kvin homoj por pripensi taŭgajn demandojn dirotajn al la monarko. Vespere, ili intervjuas la monarkon dum pli-malpli du horoj. Tiam ili manĝas, pensas, (eble promenas en ĝardeno), dormas.

Dimanĉon:

Denove la aprezantoj kunvenas matene en grupoj (malsamaj je sabate) de kvar homoj. Ili diskutas siajn opiniojn pri la konduto en ofico de la monarko, kaj pri la respondoj donintaj dum la intervjuo. Posttagmeze, ili voĉdonas (sekretabalote, kompreneble) pri ĉu tiu persono rajtas daŭri kiel monarko. Ilia elekto estos inter du ebloj: aprobo aŭ malaprobo. Oni

nombros la aprobojn kaj malaprobojn kaj kalkulas la diferencon. Se la sumo da aproboj superas la sumon da malaproboj, la monarko restas en ofico; alie, nova selektado devas okazi. Post tiam, la aprezantoj meritas bongustan manĝon, kaj pagon! Tiam ili reiros al sennoma ordinara vivo.

Aldona afero: necesos por helpi juĝi la taŭgecon de la monarko ia kodo de konduto. Kiel starigi tian aferon? Jes, vi prognozis ĝuste: kompreneble per aleatora selektado de landanoj el la registro. Ili kunvenos en asembleo por skribi ne-tro-longan liston da reguloj pri monarka konduto. Laŭ mi, la nombro da homoj en tia asembleo devos esti inter cent kaj ducent. (Tiu ĉi asembleo ankaŭ povos sugesti regulojn pri kion fari kiam la monarko malsaniĝas, kaj kiel trakti alia nenormalajn cirkonstancojn. Kiel bone organizi la asembleon estas temo por alia artikolo.) Probable oni bezonus ankaŭ vic-monarkon, por dividi la laboron kaj por eventualoj kiel malsano de monarko ktp. Selektado de vic-monarko povus okazi tiel, kiel je la monarko, sed ne samtempe.

Jen respublika monarkio! Aŭ ĉu mi devas diri: monarkia respubliko? Kiel vi opinias pri ĝi?

Unu avantaĝo: la hereda reĝo aŭ reĝino, ekzemple reĝido Karlo, povus ĝui mallongan tempon kiel monarkon kaj gvidi sian posteulon.

Dua avantaĝo: eblus forigi tre maldecan aŭ tre malbonan monarkon relative rapide, kaj sen perforta renverso.

Tria avantaĝo: malpli multekoste estus aranĝi tiajn eventojn ol plenajn balotadojn. Krome, tre malmultekosta estus tiu nova monarkia sistemo ol la antaŭa, eĉ se oni pagus la lotumatan monarkon tre malavare el vidpunkto de la grandnombra plejparto da landanoj. (La nuna reĝfamilio povus retenigi du el siajn bienojn, unu en Anglio, Sandringham,

kaj unu en Skotlando, Balmoral. Ne zorgu: ili restus tre riĉa, kvankam la kronbieno ('crown estate') ne devus resti kiel familie privata posedaĵo sed nepre aparteniĝus al la tuta popolo.)

Kvara avantaĝo: la monarko estus aŭtenta reprezentato de la nacia landanoj.

Kvina avantaĝo: finfine ni britoj iĝus civitanoj, ne regatoj!

Eble iu leganto pripensas malavantaĝojn? Tiukaze, ni invitas vin submeti artikolon, kiu priskribas pli bonan sistemon. Koran dankon. 😊

Fare de Riksablo, Marto 2021.

Recenzo fare de Richard Forsyth pri la libroronda libro

de la gotenburga klubo. Nun li mem partoprenas en la rondo.

Lia esperanta nomo estas Riksablo.



"Sesdek ok" de Sten Johansson

Recenzo de Riksablo (Richard Forsyth) el Originala literaturo Esperanta (literaturo.esperanto.net)

Sesdek ok de Sten Johansson

Eldono de Mondial, Novjorko (2020); 186 paĝoj.

En Januaro ĉi-jara mi trarigardis EventaServon por decidi ĉu mi volus partopreni en internacia kunveno per reto. Mi notis kunvenon en Gotenburgo, Svedio, kie oni proponas kunveni por diskuti la romanon *Sesdek ok* de Sten Johansson. Ĉe la reta librovendejo de UEA la priskribo de la romano ŝajnis interesa al mi, do mi mendis la libron.

Ĝi alvenis senprobleme al mia domo post unu semajno, kaj mi komencis legi ĝin. Ankaŭ mi rekomencis serĉi la Esperanto-Societon de Gotenburgo. Nu, post kiam mi sukcesis trovi la ligilon (kie estas: <https://www.esperanto-gbg.org/eo/>) mi iom ĉagrenite legis: "La nombro de partoprenantoj jam atingis la supran limon."

Domaĝe! Sed mi havis freŝan, bonaspektan libron, la plej novan libron de Sten Johansson; do mi legu.

Fakte, malgraŭ la tromalfruo, pro kiu mi ne povis aliĝi la Gotenburgan libran diskutorondon, mi estas tre kontenta pri mia aĉeto. Ĝis tiu ĉi jaro mi ne konis Sten Johansson. Nun mi scias, ke li estas fama Esperantoverkisto. Ankaŭ li verkas svedlingve.

La romano *Sesdek ok* temas pri sveda studento de lingvoj, kiu estas esperantisto. Por lia universitataj studoj li devas pasigi jarduonon en Parizo, ĉe la Sorbono. Tio okazas dum la jaro 1968, kiel la titolo montris. Mi mem memoras tiun jaron, kiam ankaŭ mi estis universitata studento, kiel

politike eventoplena tempo. Do mi pretigis min por rememorigo de la etoso de tiu ekscita jaro.

La ĉefprotagonisto, Björn (kiel mi eklernis de la libro, tio signifas urson), havas svedan koramikinon en sia universitato, ĉe Lund, sed dum lia loĝado en Parizo ŝi translokiĝas al Uppsala. Krome, antaŭ la vojaĝo de Urso al Francio, li partoprenis SAT-kongreson en la najbara urbo Malmö. Tie li renkontis francan junulinon, kiu nomiĝas Danielle, aŭ Dani. La romano havas la formon de rakonto skribita de Urso al sia koramikino, Ingrid, post sia reveno el Francio. Kiel vi jam divenis, tiu ĉi historio estos rakonto de amo, amoro kaj politiko.

La lingvo fluas glate, kaj laŭ mi ĝi estas facile komprenebla. Krome, la libro enhavas glosareton de ne-PIV-aj vortoj. Do mi estis rapide tirata tra la historio. Mi trovis la tutan etoson de la romano konvinka. La motivoj de

la fikciaj personaj, la interhomaj sentoj kaj la politikaj agadoj ŝajnis kredeblaj al mi. La stilo memorigis min pri la verkoj de la japano Hiruki Murakami, en tiu ĉi senco: ke la vira ĉefprotagonisto ŝajnas relative pasiva, kiel iu, al kiu eventoj okazas, ne iu, kiu igas okazaĵojn. Mi kredas ke tia rakontvidpunkto estis nomita la stilo de "mi estas fotografilo" de Christopher Isherwood. En tiu ĉi rakonto, la virinoj faras okazaĵojn. Poste la viro meditas pri tiuj okazaĵoj!


Mi ne malkaŝos la finan malvolviĝon, nek ĉu ĝi estas feliĉa aŭ alia. Mi diru nur, ke mi opinias, ke legantoj estos kontentaj, se ili legus ĉi tiun libron.

Pliaj informoj pri Sten Johansson, kaj aliaj verkistoj, estas trovebla ĉe:

<http://literaturo.esperanto.net>

Riksablo

Bo Sandelin rakontas pri Olle Olsson, la ŝatata esperanto-instruisto de Skanio



Bo Sandelin

Vi jam iomete renkontis Olle Olsson en la februara numero de Ora Ĵurnalo. Tamen estas multe pli rakontinda pri li.

Jen artikolo de Bo Sandelin, iama lernanto de Olle Olsson.

Unu septembran vesperon en 1963 mi kiel novulo vizitis la bonvenan aranĝon por la novaj studentoj de la universitato de Lund. Ĝi okazis en la granda salono de la domo de "Akademiska Föreningen".

Je la eniro anoj de la studenta Esperantoklubo disdonis presitajn kartojn, kiujn interesitaj plenigu kaj sendu al adreso ĉe Bantorget.

Mi jam antaŭe lernis iomete de Esperanto, kaj nun vidis eblecon iom pli profunde studi la lingvon. Do, mi ensendis la karton.

Baldaŭ venis invito al informvespero en malpli granda ĉambro de Akademiska Föreningen. Mi iris tien. Ekster la ĉambro renkontis min kvindekkelkjara viro kaj demandis ĉu mi intencas iri al la Esperantoinformado. Mi jesis, kaj li afable gvidis min en la ĉambron.

Tiu viro kiu ja ne aspektis kiel tipa studento kaj kiu efektive trapasis siajn studjarojn trideko da jaroj pli frue, tamen montriĝis esti la kasisto de la Studenta Esperantoklubo kaj la posedanto de la adreso en Bantorget t.e. Olle Olsson. Li en oktobro 2003 forpasis post longa vivo en la servo de siaj idealoj.

Ni estis tri partoprenantoj en la kurso, kiu komenciĝis post la informvespero, kaj kiun Olle gvidis. Estus troigo diri ke li estis pedagogo je la fronto de la instruarto. Li sekvis la tradician procedon per legado, tradukado kaj gramatika komentado pri la tekstoj de la lernolibro "Allas andra språk" (Ĉies dua lingvo). Sed neniu rapide stariĝis por foriri, kiam la oficiala leciono de la vespero finiĝis, ĉar tiam post kelkaj sondantaj frazoj atendis interesokapta postleciono: Olle libere kaj kun kreskanta entuziasmo rakontis pri travivaĵoj en la Esperantomondo. Tiel ni, sidantaj sur la malmolaj lignaj seĝoj en la ejo de la Esperantoklubo de Lund en Erik Dahlbergsgatan unuafoje enflaris la etoson de internaciaj kongresoj, aŭdis pri gramatikaj bataloj kaj eksciis pri afablaj klaĉoj, ĉar Olle neniam disvastigis malican klaĉon.

Tiuj, kiuj iam vizitis la modestan subtegmentan loĝejon de Olle ĉe Bantorget scias ke ĝi ĉiel atestis, ke la enloĝanto estas ĝisostulo por kiu materia komforto neniom gravas sed la ideoj ĉiom gravas. Li havis du malgrandajn ĉambrojn. La unua estis lia laborĉambro, kaj la pli interna estis lia dormoĉambro. En la unua ĉambro estis skribotablo, sofo, fotelo kaj pli simpla seĝo, sur kiu li mem sidis, kiam li uzis sian skribmaŝinon aŭ havis gaston.

Sur la skribotablo etendiĝis kelkdecimetra tavolo de diversaj esperantaĵoj – broŝuroj, leteroj, libroj k.t.p. Nur unu eta spaco estis rezervita por la skribmaŝino, kiu estis ekipita per la specialaj Esperantosignoj. La sofo simile estis plenigita per presaĵoj.

Do, por vizitanto restis la fotelo. Ĝin Olle provis teni libera. Tial sur ĝi estis nur tiom da paperaĵoj, ke Olle povis rapide forpreni ilin, por ke la vizitanto povu sidi. Ne estis malordo, nur manko de spaco.

Dum kelka tempo en la 1960-aj jaroj mi estis prezidanto de la Studenta Esperantoklubo de Lund. Kvankam malmultaj personoj aperis ĉe kunvenoj la listo de memjbroj estis sufiĉe longa. Tio havis klarigon. Kontraŭe al kasistoj kiuj defraŭdas la kason, Olle pagis la membrokotizon por multaj homoj, kiuj iam, iel montris etan intereson pri Esperanto. Tiel ili ricevis revuojn kaj diversajn informilojn. Mi ne scias ĉu iu el ili fariĝis aktiva esperantisto, sed certe ili fariĝis homoj, kiuj scias ke Esperanto estas viva fenomeno.

La mondo bezonas pli da homoj kiel Olle.

Bo Sandelin

Printempaj hajkoj

Printempa suno –
en la ĝardeno
la paseroj banas sin en la sablo.

Onitsura



Piedsignoj
sur la sablostrando –
malrapida printempa tago.

Shiki



La naturo skulptis "ŝtonan urbon"

Dum reta kunveno aranĝita de la pola klubo Torento, nia tasko estis: Rakontu pri la plej stranga loko al kiu Esperanto venigis vin. Por la unua fojo iu konis "mian" lokon. Paulina iam vizitis ĝin, kaj rapide ŝi kunprenis bildojn

kaj tekston. Parenteze ŝi mem elektis Gotenburgon kiel ŝian plej strangan lokon!? Per ŝiaj bildoj ni revenis al la somera kurso en 2018!!

Jen ŝia letero:

Kara Siv,

Vi menciis hieraŭ dum "babilado kun Torentanoj" pri via vojaĝo al Ĉeĥio, kiam vi vizitis tiel nomatan Ŝtonan Urbon – tamen vi ne multe memoras. Mi tuj ekmemoris, ke mi ankaŭ iam vizitis la Ŝtonan Urbon en Ĉeĥio kaj eĉ havas ie fotografaĵojn de tiu loko. Do mi malfermis malnovan fotoalbumon kaj trovis kelkajn fotografaĵojn de mezlerneja ekskurso al la montaro. Kio okazis? La fotografaĵoj ne havas surskribojn. Mi memoras homojn sed ne lokojn.



Tabla Montaro – en la pola "Góry Stołowe" kaj en la Ĉeĥa "Stolové Hory" – troviĝas parte en Pollando kaj parte en Ĉeĥio. La nomo venas de tio, ke la montaro ne havas akrajn pintojn – kaj iomete aspektas kiel tabloj.

Malnovaj rokplatoj, 30 milionoj jaraĝaj, estas krevitaj kaj eroziitaj. En Tabla Montaro oni povas viziti almenaŭ tri vidindajn rokajn labirintojn – Ŝtonaj Urboj. Du en Pollando kaj unu en Ĉeĥio.

En la pola flanko oni povas viziti Vagajn Rokojn (Błędne Skały). Tie oni povas perdiĝi en labirinto de malvastaj koridoroj.






Vidu kiel aspektas Vagaj Rokoj en maps.google.com.

La dua loko en la pola flanko estas "Szczeliniec Wielki" – la plej alta monto de Tablaj Montoj. En krevitaj rokoj naturo skulptis diversajn bestojn: kamelon, hundon, elefanton, strigon kaj aliajn.

Jen kamelo:



Adršpašskoteplické skály troviĝas en la ĉeĥa flanko de la montaro. Ili estas eĉ pli monumentaj kaj pli vastaj. Tie oni povas rigardi sabloŝtonon en diversaj formoj:





kolonoj, muroj, koridoroj ravinoj, do la ŝtona urbo estas ege ĝusta nomo.


Troviĝas tie ankaŭ bestformaj kaj homformaj skulptaĵoj, akvofaloj kaj bela lago.

Kara Siv, ĉu tiun ŝtonan urbon vi vizitis? Laŭ mi ĉiuj tri estas belaj kaj vidindaj.

Kaj jen la bildo de mi en la ŝtona labirinto antaŭ pli-malpli dudek jaroj.

Ĉiuj fotografiaĵoj krom la lasta venas el Vikipedio.

Paulina



Al la "Guchoj" kaj la malsanuleja sekcio 357

de Christin Granat



(Guch = Grown up with congenital heart disease = adulto kun denaska kormalsano.)

Komence mi estis en la Guch-sekcio. Unue mi kiel kutime estis ekzamenita de flegistino, kiu faris EKG-on, (elektro-kardiogramon), kontrolis la enhavon de oksigeno kaj la sangopremon. Oni konstatis ke ĉio ne estas en ordo.

Poste mi renkontis kuraciston, kiu faris ultrasonon, kaj oni diris la samon kiel antaŭe. Oni faris kelkajn sangokontrolojn – kaj vere doloris! Du personoj devis fikstani min, mia paĉjo kaj la flegistino en GUCH. De tie mi iris per rulseĝo al radiografia ekzameno de miaj pulmoj.

Poste mi iris rekten al la sekcio 357, kie mi tuj sentis min bone, kiam mi envenis. Ili donis al mi manĝaĵon.

Post la manĝado mi iomete ripozis. Pli poste venis flegistino, kiu prizorgis miajn medikamentojn, sed la nadlo eksaltis el la medikamenta eniro al la vejno. Do ŝi venigis viran flegistinon, kiu komencis klarigi al mi kion li faros, por ke mi sentu min sekura kaj trankvila. Li vidis ke la virina flegistino kaj mi interŝanĝis rigardojn. Li demandis al ŝi, ĉu ŝi havas alian pacienton por prizorgi, ĉar li volis paroli kun mi sen atestantoj.

Kiam ŝi foriris li komencis paroli kun mi pri mia bonfarto. Li ankaŭ diris ke li farus nenion – eĉ ne pikus min – sen antaŭa averto. Tiuj vortoj li uzis kiel mantra, por ke mi ne havu panikon. Li konstruis bonan relaton inter ni.

La unua telefonvoko venis de panjo kaj paĉjo, kiuj demandis kiel mi sentas min en la hospitalo. Mi tiam sidis vespermanĝanta, kaj kiam mi ĵus estis faranta respondon, mi ekhavis egan tusadon, kaj mi devis interrompi la interparolon. Mi forkuris por kapti iom da aero.

Tio estis antaŭ ol mi sciis ke la sekcio 357 estas fermita sekcio. Kompreneble mi pensis ke okejas eliri. Ne estas facile scii, kiam oni estas paciento en nova sekcio.

Mi estis puŝita enen denove, kaj ekhavis grandan sputsitelon el plasto.

La unuan matenon mi ellitiĝis je la oka por kontrolo de la sangopremo, la temperaturo kaj la pezo. Jam nun mi perdis kvar kilogramojn. Mia « laboro » tuttempe konsistis el irado al la necesejo por pisadi la tutan tempon, por ke mi daŭre perdu pliajn kilogramojn.

Meztage amiko telefone vokis min. Ŝi volis scii kiel mi fartas. Pli malfrue vespere mia fratino telefonis. Ankaŭ ŝi volis scii kiel mi fartas. Ŝi aŭdetis ke mi anhelis.

Mia unua kunulino Elionore vokis min ĉiun vesperon, demandante kiel mi fartas. Ni ambaŭ longe interparolis vespere.

Dufoje tage mi ricevis kalion (salajn tablojdojn), ĉiun matenon kaj ĉiun vesperon, por ke mi ne perdu la salon de la korpo, ĉar mi havis likvaĵdemetintan medikamenton.

La lundon antaŭ 14 tagoj mi iris al UTG-rentgeno kaj oni faris 14 bonajn bildojn. En la sekcio 357, kie mi estis, ili estis ŝparinta mian manĝadon ĝis mi estis ree. Bonŝance, ĉar ja estis pastaĵo kaj kokidaĵo. Plej ofte oni surtabligis nur terpomojn tie kaj mi demandis al flegistino kial estas tiel. Ŝi respondis, ke averaĝe estas nur personoj de la kvardekaj jaroj, kiuj loĝas ĉi tie kaj ĉiuj tiuj pacientoj estas al kutimigitaj al terpomoj. Ŝi ankaŭ diris ke « vi, kiuj estas iomete pli junaĝaj pli facile kutimiĝas al aliaj manĝaĵoj ol tiuj, kiujn vi kutime manĝas ». Ŝi samopiniis kun mi ke ankaŭ pico, pastaĵo kaj nudeloj estas ege bongustaj. Ŝia favorata manĝado estas nudeloj, ŝi rakontis al mi.

Mi telefonis hejmen al panjo kaj paĉjo ĉiun matenon post la rondiro, por ke ili eksciuj ĉion, laŭeble plej multe. Mi telefonis al konulo, la eksa posedanto de mia hundo kaj al mia onklino kaj onklo. Ĉiuj fartis bonege. Mia kompanino kontaktis min per Messenger. Alia konulo de Gunnilse ankaŭ

kontaktis min per Messenger kaj deziris al mi bonŝancon. "Zorgu pri vi, mia amikino!"

Miaj puntaj subvestoj ne estis tre popularaj inter la personaro: La vira flegistino pensis ke ili ŝajnis iomete tro malgrandaj por mi. Ili surmetis sur min la subvestojn de la hospitalo, ĉar ne estis facile por mi ŝanĝi veston. La maldekstra mano estis enpakita per bandaĝo por fiksi la kanulon. La personaro preferis ke oni uzas la hospitalan vestaĵon, kiam oni estas en la sekcio.



Vespere mi legis multon kaj studadis sciadon de hundoj, kaj paroladis multe kun Caroline. Ni ambaŭ kuŝis en la sama ĉambro.

Ni ĉiam vespermanĝis je la 17a horo. La panoramo de mia fenestro estis bonega. Mi ĉiam rigardis la belajn sunleviĝojn kaj sunsubirojn. Ĉiun vesperon mia amikino telefonis al mi.

Por interŝanĝi kanulojn oni ĉiun – aŭ ĉiun duan – vesperon devis "piki" min per injektilo. La kuracisto trejniis min ne krii, kaj pro tio mi fariĝis pli trankvila. En la dimanĉa vespero mi tute ne kriis, kaj la kuracisto laŭdis min. Neniam estis facile piki min. Lundan matenon kuracisto diris al mi, ke miaj

sangvejoj estas same mincaj kiel kudrofadenoj.

La amuza kuracisto pensis ke mi devas ridi al ĉiuj injektoj, kiujn mi ricevas. Unu sangokontrolon oni faris je la sesa matene – ja iomete malkomforte!

Foje la noktoflegistino provis piki min, sed ŝi malsukcesis kaj devis venigi alian flegistinon, kiuj estas pli sperta pri ege malgrandaj sangovejoj. Ŝi sukcesis post la dua provo.

Bedaŭrinde mi havis problemon vidi kiu estas kiu en la personaro, ĉar ili pro la pandemio ja portis vizierojn, aparte malfacilis, se estis malhelele ĉirkaŭe. Frumatene mi ne vidis ĉu estas la amuza kuracisto, kiu estas laca aŭ alia virina kuracisto. Tion mi rakontis al la amuza kuracisto iun vesperon, kiam estis tempo por mia medikamento, kaj tiam li ekridegis.

Posttagmezon, kiam mi sidis manĝanta, la amuza kuracisto kun alia pli silentema kuracisto venis por decidi ĉu mi povas hejmeniri aŭ ne. Ili palpis miajn krurojn kaj piedojn kaj ili facile konstatis ke ne eblas hejmeniri nun.

Mi fariĝis iomete acidhumora, sed baldaŭ la humoro pliboniĝis. La kuracisto, rigardante al mi, diris, ke estas pli bone ke la medikamento havas tempon kuraci iomete tro malrapide ol tro rapide. Krome ni povas kontroli vin kaj vian likvaĵon. Li volis konsoli min, kiam li vidis mian malĝojan mienon. Tamen mi sentis min bone ankaŭ post tiu informo.

